INTRODUCTION TO EPISODE FIFTEEN

TEACHER Greetings! It's scarcely credible that we have reached the last lesson in the series. In the present lesson we will take the occasion to strengthen the grammar already more or less known to us. For example: participles. Participles can end with *-a* or *-aj* (adjectival participles) and *-e* (adverbial participles).

However, participles can also end with -o. Those are nouns. For example, Karlo runs, so he is a runner (kuranto). If he stops running, he is a former runner (kurinto); but if in the future he again participates in a marathon, he is a future runner (kuronto).

And if your head aches now, relax! Esperanto is based mainly on logic, and doubtless you notice the logic in the sequence *kaptinto/kaptito, kaptanto/kaptato, kaptonto/kaptoto*. Yes, at first glance everything seems confusing, but compared with national languages Esperanto is much easier, due to its internal logic.

However, enough about logic. Logic - fundamental to the structure of Esperanto- is seemingly completely lacking in the affairs of the Bonvolo family. It's time to learn how the family's problems will be solved. So watch, listen, enjoy!

[Note: There is no conclusion to Episode Fifteen.]

ENKONDUKO AL EPIZODO DEKKVIN

INSTRUISTO: Saluton! Apenaŭ kredeble estas, ke ni atingis la lastan lecionon de la vidbendoserio. En la nuna leciono ni kaptos okazon plifortigi gramatikaĵojn jam pli-malpli konatajn. Ekzemple: participoj. Participoj povas finiĝi per -a aŭ -aj (adjektivaj participoj), kaj -e (adverbaj participoj).

Tamen participoj povas finiĝi ankaŭ per -o. Temas pri substantivoj. Ekzemple, Karlo kuras, do li estas kuranto. Se li ĉesas kuri, li estas kurinto; sed se en la estonteco li refoje partoprenos maratonon, li estas kuronto.

Kaj se nun ekdoloras al vi la kapo, trankviliĝu! Esperanto baziĝas ĉefe sur logiko, kaj sendube vi rimarkas logikon en la sinsekvo kaptinto/kaptito, kaptanto/kaptato, kaptonto/kaptoto.
Jes, unuavide ĉio aspektas konfuze sed kompare kun naciaj lingvoj Esperanto oble pli facilas pro sia interna logiko.

Tamen sufiĉe pri logiko. Logiko - fundamenta en la strukturo de Esperanto - estas ŝajne tute malfundamenta en la aferoj de la familio Bonvolo.
Jam estas tempo ekscii kiel solviĝos la problemoj de la familio. Do rigardu, aŭskultu, ĝuu!

[Noto: Ne estas konkludo al leciono 16.]

SCENO 1 (KAFEJO ZAMENHOF)

GEORGO Filisa! Okazis io terura!

FILISA Jes . . . vi fariĝis filozofo. Anstataŭ io normala. Ekzemple bus-ŝoforo . . . fotografisto . . . elektristo . . .

GEORGO Ne . . . io pli terura.

FILISA Mi memoras. Vi fariĝis membro de la akademio de Esperanto. Jes, ja . . . terura sorto.

GEORGO Ne, ne . . . io eĉ pli terura. Ho, mi vidis ĝin, surplanke . . . ĉi tie . . . surplanke kuŝanta, senmova . . . sed ŝi ne kulpas . . . kredu min . . .

FILISA Kion vi vidis . . . ? Kaj kiu ne kulpas? Georgo . . . !

GEORGO Kadavro . . . sternita senspire . . . Helena . . .

FILISA Nia filino . . . mortinta . . . ve, oble ve . . .

GEORGO Uh! He . . . ? Ne tiel ...Ne tiel. Ne, ne.

FILISA Ho, ve, mia filino! Mia kara filino - morta!

SCENO 2 (HEJMO)

KARLO Be . . . atentu! Vi preskaŭ forbatis mian nazon. Sed . . . kion vi faras? Kial vi tiel pozas . . tiel gestas?

NINA Karlo! Mi koncentriĝas.

KARLO Be! Ĉu vi volas, ke Helena skulptu vin?

NINA Baf! Rompita la koncentriĝo. Ĉu vi ne vidas, ke mi ekzercas min?

KARLO Be . . . se vi volas ekzerci vin . . . nepras streĉi la muskolojn . . . la muskolojn de la kruroj . . . jen. Bona atleto . . . bona kuranto . . . bezonas . . .

NINA Bonajn muskolojn. Sed . . . mi ne estas kuranto. Ne plu. Mi estas . . . kurinto.

KARLO Kurinto . . . ?

NINA Mi ne ekzercas min atlete - mi ekzercas min aktore.

KARLO Aktore?

NINA Nu, samkiel vi, poete.

KARLO Be . . . ĉiu esperantisto estas poeto.

NINA Sed vi ne estas diletanta poeto, male. Do ankaŭ mi volas liberigi la talenton en mi. Kuri mi kapablas . . . sed aktori . . .

KARLO Aktori . . . ? Be . . . vi neniam trejniĝis ...

NINA Ĉu mi ne nun aktoras . . . ludante la rolon de araba sinjorino?

KARLO Be . . . Jolanda tuj rekonis vin . . .

NINA Jolanda saĝe juĝis, jes. Tamen ĉu ne viajn gepatrojn mi sukcese trompis . . . ? Do, imagu . . . la plej kortuŝajn rolojn de niaj famaj dramistoj mi ludos . . . Baghy . . . Boulton . . . dum Universalaj Kongresoj mi aktoros . . . prezentante originalajn teatraĵojn , neniel tradukitajn . . .

KARLO Be . . . fantaziaĵoj.

NINA Kaj verkos por mi la originalajn teatraĵojn . . . vi, Karlo . . . vi!

SCENO 3 (KAFEJO ZAMENHOF)

GEORGO Ne! La kadavro ne estis Helena. Ĝi estis la kadavro de la impostisto!

FILISA Impostisto? Kiu impostisto?

GEORGO Ho... nu ... sciu...

FILISA Egale. Tamen ... se ekzistis kadavro ... kie ĝi kaŝas sin? Aŭ ĉu ĝi fortrotis ... kiel komplezema kadavro ... kaj sin enterigis en tombejon?

GEORGO Ho, nun vi primokas min.

FILISA Ne, Georgo, vi primokas min. Ĉar kadavroj ne moviĝas . . .

GEORGO Male! Se la kadavro fariĝis fantomo . . . Vu . . . ! Vu . . . !

FILISA Georgo! Ne plu ! Sed sendube la kadavro ekzistis nur en via menso! Do . . . for! Mi ne plu toleras. Iru al la prezidanto de la akademio, kaj diskutu participojn, aferon ita/ata.

GEORGO La prezidanto . . . geprezidantoj! Certe . . . la ĉarma araba sinjorino, kiu verdiktas pri mankantaj akuzativoj, certe kapablas verdikti pri mankanta kadavro. Jes . . . mi iros!

FILISA Sinjorino . . . ? Sed . . . la prezidanto estas sinjoro. La araba sinjorino estas simple . . . pasportserva gasto. Ho, ve! Georgo malsanas pli ol mi kredis!

SCENO 4 (HEJMO)

AZIZ Vere . . . multe pli bone mi fartas . . . dank' al vi . . .

JOLANDA Ho, ne dankinde. Nenion mi faris . . .

AZIZ Sendube . . . mi terure embarasis vin . . . parolante pri paradizo . . .

JOLANDA Neniel, sinjoro . . . ĉar trafis vin terura akcidento. Tamen diru . . . kio okazis?

AZIZ Jen, frenezulino . . . blekanta pri ŝafo . . . kaj alia frenezulo ... kiu taksis min prezidanto de la akademio de Esperanto...

JOLANDA Ho, eklumas ĉe mi ... mi esploros pli...

AZIZ Sed zorgu . . . gardu vin . . . jen homoj danĝeraj . . .

JOLANDA Eble. Kaj eble ne. Tamen . . . dankon pro via averto. Hmm . . . jen sinjoro simpatia ... vere simpatia.

SCENO 5 (PARKO)

BARDO Ve! En mia kapo . . . anstataŭ simfonion . . . mi aŭdas kakofonion . . . En la oreloj . . . anstataŭ harmonion . . . mi konscias nur manion . . .
Ĉar en la kafejo . . . anstataŭ amon . . . mi trovis nur dramon. Jes . . . kvazaŭ televida dramo ... murdo-mistero. Sed . . . kion fari? Ĉu iri al la polico? Ruselo parolis pri detektivo ... Kio . . . ? Ĉu do stulta kaj surda detektivo . . . ? Do, bone . . . pri la detektivo mi rezignos. Tamen . . . restas problemo pri . . . Helena! Kara! Amata . . . ! Kredu min . . . ĉio, kion mi kanzone kantis . . . ĉio, kion mi muzike mesaĝis . . . estas la plej pura amo.

HELENA Amo? Ne!

BARDO Tuj, kiam mi aŭdis la sonon de via voĉo . . . estiĝis en mi misteraj melodioj . . . nekonataj kordoj . . .

HELENA For, malfeliĉulo . . . for! De unu malfeliĉulo al alia . . . for!

BARDO Kio . . . ?

HELENA Ho . . . kara Bardo . . . je via amo mi ne indas. Neniel. Mi petas vin do forviši min el via memoro. Forgesu min..

BARDO Forgesi . . . ? Neeble! Vin mi kaptis . . . kaj neniam liberigos!

SCENO 6 (HEJMO)

GEORGO Ho . . . pardonon . . .

NINA Kio . . . ? Ho . . . ne gravas . . .

GEORGO Sendube vi ekzercas vin . . . preparante vin por grava parolado antaŭ la Akademio de Esperanto . . .

NINA Kio . . . ? Ho, jes . . . la akademio . . .

GEORGO Nu, via prezidanta moŝto . . . mi volas paroli pri iom tikla afero. Sendube la prezidanta moŝto povos saĝe konsili . . .

NINA Nu . . . eminenta sinjoro . . . memevidente . . . ke vi volas, ke mi fariĝu oazo, kie vi povos sensoifiĝi en tiu ĉi vasta dezerto de homa ekzisto . . . estas por mi honoro la plej alta. Kiel mi povos vin servi?

GEORGO Nu . . . via prezidanta moŝto . . . opinion pri kadavro mi petas.

NINA Kadavro . . . ?

GEORGO Jes. Ekzemple . . . kion fari kun ĝi?

NINA Nu . . . *kadavro* . . . substantivo . . . oni povus ĝin adjektivigi . . . ekzemple *La ulo havas kadavran vizaĝon.* Aŭ adverbigi *... li mienis kadavre...*

GEORGO Ne, ne . . . vi miskomprenas . . .

NINA Aŭ el ĝi krei *ig*-verbon . . . do . . . *la soldatoj kadavrigis siajn malamikojn* . . . aŭ kombini ĝin kun afiksoj ... kadavrejo...kadavraĵo ... vidu, kiom flekseblas nia lingvo ... aŭ eble . . .

GEORGO Ho, ve! Se tiel konsilas la akademio . . . ho ve!

NINA Nekredeble! Ĉu mi iel pekis kontraŭ la Fundamento de Esperanto?

SCENO 7 (PARKO)

BARDO Ne . . . mi komprenas absolute nenion. Kiel vi krimis . . . diru!

HELENA Kredu min . . . tio, kion mi faraĉis, tro abomenindas por esti eĉ flustrata . . .
Mi estu kunkalkulata kun la fiuloj de la mondo ... kun la monstroj, la diabloj...

BARDO Sed amo, kara Helena . . . amo venkas ĉion . . .

HELENA Kaj do mi fuĝos . . . tien, kien eĉ birdo ne flugas . . .

DETEKTIVO Ho ho . . . ! Kaptita . . . kaj estas vi, sinjoro, kiu iros, kien eĉ birdo ne flugas . . .

BARDO Kio . . . ?

DETEKTIVO Ne neu! Mi vidis vin eniri la kafejon . . . mi aŭdis, kio ene okazis . . . kaj sekve mi arestas vin .

HELENA Mi travivas koŝmaron . . .

DETEKTIVO Arestas vin pro la murdo de la prezidanto de la Akademio de Esperanto, kies kadavro kuŝas en kafejo Zamenhof . . . kie kuŝos estonte nur miaj kanzonoj . . . ne viaj! Kaj nenio . . . neniu . . . savos vin.

HELENA Tamen mi . . . mi savos vin. Ĉar kulpas mi!

DETEKTIVO Silentu, fraŭlino Helena .. ne ŝovu nazon en fremdan vazon ...

HELENA Sed . . . la vazo ne fremdas ...

BARDO Bonvole . . . iu . . . klarigu, kio okazis . . .

DETEKTIVO Volonte . . . en prizono. Venu, kien eĉ birdo ne flugas . . . sed Bardo, jes!

HELENA Ne! Atendu . . . ! Atendu . . . ! Ho, ve!

SCENO 8 (KAFEJO ZAMENHOF)

GASTO #1 He . . . sinjorino! Kie estas mia oranĝsuko . . . ? Ĉu vi mem devas kreskigi la oranĝojn?
GASTO #2 Antaŭ horduono ni mendis kafon . . . ĉu vi mem devas rikolti la grajnojn?
GASTO #3 Mia komputilo ne funkcias - helpu min!
GASTO #4 Kaj kie la muziko? Oni promesis bonan muzikon . . . elstaran kanzoniston . . . kaj nenio aperis. Ĉu mi mem devas kanti?

ĈIUJ GASTOJ Ne!

FILISA Paciencon, mi petas. Ĉio aranĝiĝos . . . ĉio. Ho, ve! Georgo, Karlo, Helena . . . Jolanda . . .. ĉefe la kantanta detektivo . . . kie vi estas?

SCENO 9 (PRIZONO)

BARDO

Enkarcerigite, prizona mizer',
Entombigite, en ĉerk' sen aer',
Ĉirkaŭate de baroj, kradoj el fer',
Mi tamen kantas en hela esper'.

Ĉar . . . la nigron traboras radio,
Radio de fora sun',
Kuraĝon ŝpinanta lumstrio,
Fadenon, ho! de fortun'.

Jes . . . radie ni komunikiĝas,
Per ora, silenta son',
Kaj tiel senvoĉe aŭdiĝas
Ĉe vi mia am-kanzon'.

Ho . . .tiele mesaĝas espero,
Pri ekradianta am',
Mi scias, ke am' kaj libero
Ekflagras pro sama flam'.

SCENO 10 (HEJMO)

DETEKTIVO Jes. . . arestita estas la monstro, kiu mortigis . . . brutale buĉis .. .la prezidanton de la Akademio de Esperanto.

GEORGO A! He! Kio . . .? La prezidanto . . . ?

DETEKTIVO Jes, kaj la poltrono nun ŝvitas, en plej nigra, plej profunda karcero . . . el kiu eskapi ne eblas.

GEORGO Momenton . . .Ĉi vi ne diris 'prezidanto' . . . ? Mi ĵus parolis kun la prezidanto...

DETEKTIVO Hoho . . . amuze, jes . . . parolanta kadavro . . . sed neeble, sinjoro. Neeble!

AZIZ Sinjoroj . . . mi provas ripozi . . .

DETEKTIVO Ve! Parolanta kadavro!

GEORGO Ve! Fantomo!

DETEKTIVO/GEORGO Ve . . . !

SCENO 11 (PARKO)

KARLO Akto unua, akto dua, akto tria, . . . jen! La fundamento de teatraĵo klasika. Sed ĉu mi vere volas fariĝi dramverkisto? Ĉu tiel mia vivo fariĝus tragedio, se mi malsukcesus? Aŭ komedio, ĉar pro mia manko de talento ĉiu primokus min? Kaj tiel ... anstataŭ estigi komediojn . . . mi mem fariĝus komedio. Ho, ve . . . kion fari?

SCENO 12 (ĜARDENO)

DETEKTIVO Se vi estas nek kadavro . . . nek prezidanto de la akademio . . . kiu vi estas?

AZIZ Mi apenaŭ plu scias . . . mi konfuziĝas . . .

DETEKTIVO Denove . . . Georgozo-simptomo . . .

GEORGO Kio . . . ?

DETEKTIVO Nenio, sinjoro. Daŭrigu, mi petas.

AZIZ Nu . . . oni kredis min lingvisto . . . mortinto ... atakonto de juna sinjorino ...

GEORGO/DETEKTIVO Pardonon!

AZIZ Sed fakte . . . mi estas impostisto, veninta ĉi tien por kolekti ankoraŭ nepagitajn impostojn.

GEORGO La impostoj? Efektive . . . mi preferas vin fantomo . . . ĉu vi ne volas refariĝi fantomo?

DETEKTIVO Interese . . . nepagitaj impostoj. Do kiu, ne paginte, krimis meritante enkarcerigon?

GEORGO Pardonon . . . Filisa atendas min en la kafejo . . .

AZIZ Do, memevidente . . . ne pagis Georgo Bonvolo.

DETEKTIVO Perfekte! Do . . . arestita, sinjoro filozofo . . . pro imposto-nepago . . .Do, prizonen!

GEORGO Ne! Vi iru prizonen, sinjoro Detektivo ... vi iru!

DETEKTIVO Kio . . . ? Detektivo . . . prizonen?

GEORGO Jes . . . por liberigi tiun, kiun vi senkiale akuzis . . . akuzis pri mortigo de vivanto.

AZIZ Jes . . . tre viva vivanto. Iru!

DETEKTIVO Ve! Mi kredas, ke mi ja suferas pro georgozo. Jes, jes . . . mi iros!

SCENO 13 (PRIZONO)

BARDO

Do . . . enkarcerigite, prizona mizer',
Entombigite, en ĉerk' sen aer',
Ĉirkaŭate de baroj, kradoj el fer',
Pro vi mi kantas en hela esper'.

Ho . . . vizitantoj. Mi bedaŭras, sinjoroj, ke mi ne povas proponi refreŝigaĵojn. Kiel hotelo . . . almenaŭ speco de . . . ĝi neniel luksas.

DETEKTIVO Jes, jes . . . mi scias, kio farendas . . . Sinjoro . . . ŝajnas, ke okazis miskompreno

DETEKTIVO Nu, bone . . . do . . . fuŝaĵo . . . tio estas . . . ĉio renversiĝis . . . ĉar mortinto malmortis . . . kadavro malkadavriĝis . . . ja, el fantomo, homo . . .

GEORGO Sinjoro, vi estas libera . . . malĝuste akuzita pro la stulteco de la detektivo.

BARDO Ĉu libera . . . ? Do . . . la sunradio . . . la amkanzono . . . ili savis min!

SCENO 14 (KAFEJO ZAMENHOF)

HELENA Sed, panjo...

FILISA Diru poste, Helena . . . poste. Intertempe . . . bonvolu porti ĉi tiun pleton kun pomsuko al la kliento . . . tien . . .

HELENA Sed panjo . . . vere gravas . . . urĝas . . .

FILISA Urĝas ankaŭ la pomsuko . . . iru!

JOLANDA Panjo! Nia pasportserva ‘gasto’ volas ion diri . . .

FILISA Jolanda! Bone! Nu . . . ĉi tiun pleton . . . kun teo . . . portu al la gasto. . .al la kliento ... jen . . . sed rapidu! Faru, faru ... dum vi, estimata sinjorino, serĉu sidlokon ... mi revenos baldaŭ. Jen, prenu la menuon ...

AZIZ Finfine, sinjorino . . . nu, la nepagitaj impostoj . . .

FILISA Kio . . . ? Nepagitaj impostoj? Ho, savu min . . . tenu min . . .

GEORGO Ho, Filisa! La plej bonaj novaĵoj . . . sed . . . kio okazis al ŝi?

HELENA Bardo . . . ! Kara mia ...

BARDO Nenio . . . neniu disigos nin . . .

HELENA Por ĉiam . . . duope . . . vi kaj mi . . .
Triope . . . kun nia ŝafo . . .

DETEKTIVO Momenton! Ne forgesu, ke iu inter ni krimegis . . .
Ke iu inter ni . . . pro nepagitaj impostoj . . . iros prizonen . . . !

GEORGO Ho, Filisa . . . kredu min . . . senkulpa mi estas. Ĉar impostoj . . . jen afero tute malfilozofia ...

DETEKTIVO Jes . . . kiel prizonoj . . .

FLORA Haltu! Haltu! La filozofo Georgo Bonvolo ne iras prizonen.

GEORGO Flora Bundo . . . !

FLORA Jen ... jen la mono kiun vi bonkore el via tekruĉo pruntedonis al mi ...

GEORGO Ni donacis . . .

FLORA Pruntedonis al mi. Mil kvincent naŭdek steloj . . . plus interezo. Sendube . . . pagitaj nun estas la nepagitaj impostoj. Kaj jen . . . neniu iros prizonen.

DETEKTIVO Aaaaaaargggg . . . denove atakas min . . . georgozo!

FLORA Karlo ... permesu, ke mi vin gratulu.

KARLO Be... gratuli?

FLORA Jes. En la aviadilo ... survoje ... mi legis viajn poemojn...

KARLO Poemojn ... ?

FLORA Jes ... en *Fonto.* Vidu ... tie ĉi estas ...

KARLO Be ... miaj ampoemoj ... Pri la doktoro ... la kruelino? Sed ... mi ne komprenas ... kiel ...kial miaj poemoj aperas en *Fonto*? Mi ne sendis ...

FLORA Alia mistero ...

KARLO Nun estas mi, kiu pro ĝojo estas svenonta ... falonta ...

FLORA Be! Ne faru ... ne faru!

BARDO Do . . . ni kantu! Ni festkantu . . . ! Ankaŭ vi, sinjoro detektivo . . . kelnero . . . kiu ajn vi estas . . .

NINA Nu, Karlo . . . vidu, kiel sav-anĝelo lastaminute eltiris nin el ĥaoso. Ĉu vi same uzos vian talenton por originale, teatraĵe verki . . . por mi, via aktorino? Perfekte!

BARDO
Esperanto estas glano, kiun plantis LLZ,
Okulisto klarvidanta, malavara kuracist';
Tamen biografojn spite lin ni nomu arbarist',
Kies glano kverke kreskis – nia verda lingvo . . . do . . .

ĈIUJ
Plantante, sarkante, neniam plendante,
Nian kverkon prizorgu ni,
Fosante, tondante, tutmonde kantante,
Esperanton kreskigu ni.

GEORGO
El ĉiuj floroj plaĉas al mi
La rozo, narciso kaj bunta fuksi';
Sed Floro kun oro veninta al ni
Milstele superas – jes – filozofi'.

ĈIUJ
Plantante, sarkante, neniam plendante,
Nian kverkon prizorgu ni,
Fosante, tondante, tutmonde kantante,
Esperanton kreskigu ni.

DETEKTIVO
El prizono venas zono - premsufoka;
En libero nestas bero – gust-elvoka;
Sed balzamo (en ĝi amo)
Estas ja la riĉa gamo
De la lingvo de la knabo – Bjalistoka.

ĈIUJ ALIAJ (SAMTEMPE) HELENA
Plantante, sarkante, neniam plendante, Gitaron ludante, ĝoje kantante,
Nian kverkon prizorgu ni, La mondon travagis vi;
Fosante, tondante, tutmonde kantante, Plene feliĉaj pro la sun'ĉar unu la alian ekvidis
Esperanton kreskigu ni. Mi volas ke vi restu kun mi.

ĈIUJ ALIAJ (SAMTEMPE) HELENA KAJ BARDO
Plantante, sarkante, neniam plendante Gitaron ludante, ĝoje kantante,
Nian kverkon prizorgu ni, La mondon travagu ni;
Fosante, tondante, tutmonde kantante, Plene feliĉaj pro la sun'ĉar unu la alian ekvidis
Esperanton kreskigu ni. Mi volas ke vi restu kun mi.

FINO